

Letero el Ameriko

Jam preskaŭ unu jaro pasis, de kiam mi forlasis la malnovan kontinenton, sed la eterne rapidanta vivo de la nova mondo tiel potence kaptis min en sian vortikon, ke apenaŭ nun, profitante la libertempon, mi povas eksidi al mia skribmaŝino, por dividi kun la legantoj kelkajn el miaj impresoj pri Ameriko.

De kio komenci? Ĉu paroli pri la pasportaj, vizaj kaj devizaj malfacilaĵoj, tiel bone konataj al la loĝantoj de la malnova mondo? Ĉu pri la oceanvojaĝo per la ŝipo Batory, kiu ligas la polan havenurbon Gdynia kun la havenego de Nov-Jorko? Ĉu diri, kian ĝojon mi spertis, kiam, unu tagon antaŭ la alboardiĝo, radiotelegrafisto transdonis al mi la unuajn salutojn el la kontinento, kiuj estis kvazaŭ unuaj birdoj, anoncantaĵ, ke la tero jam estas proksime? Ĉu paroli pri la tumulto kaj emocio, videbla sur ĉiu vizaĝo malgraŭ masko de indiferenteco, kiam usonaj oficistoj komencis sur la ŝipo kontrolon de pasportoj, rimedoj, deklaroj, certigoj, por decidi pri vivo aŭ morto: enlaso aŭ nenlaso de fremdulo sur la usonan teritorion? Kio okazis en la lasta momento kun tiu maljunulino, al kiu mi helpis prepari ŝian dogan-deklaron pri samovaro kaj festaj kandelinoj, la lastaj memoraĵoj el la malnova mondo, el la malnova vivo? Nur pli malfrue la penso pri ŝi venis en mian kapon, ĉar dume mi mem travivis iom da emocio, kiam mia pasporto malaperis en la paperujo de oficisto, « kontrolonta » la verecon de miaj asertoj pri la celo de mia vojaĝo kaj pri la organizaĵo, kiu min invitis. Feliĉe oni atendis min sur la kajo. La sekretario de la Bahaa Nacia Spirita Konsilantaro, laŭ kies invito mi venis en Amerikon, estis tie por garantii pri mi per sia subskribo, rehavigi al mi la pasporton kaj trakonduki min tra bone gardataj trairejoj — sur la amerikan kontinenton. Kiel agrable estis, farante la unuajn paŝojn sur la nova tero, ekvidi la verdajn stelojn kaj ekaŭdi, en la lando de estonteco, la lingvon de estonteco!

La dogana kontrolo pasis rapide, kvankam la doganisto ŝajnis iom miri pro la baterio de kraĵonoj, pro la kaŭĉukaj bestoj kaj aliaj necesajĵoj de Cseh-instruisto. Kaj fine mi forlasis aŭtomobile la havenan teritorion, kaj ensorbis min Nov-Jorko, la plej granda urbeĝo sur nia planedo, senkompara pro siaj nubskrapuloj, pro la febra trafiko, pro la amasego da homoj, da aŭtomobiloj, da ĉio, kion la mondo posedas.

Miaj kruroj ankoraŭ tremis, kaj ankoraŭ mi sentis la balancadon de la ŝipo — sed ne estis tempo pensi pri tio. Mia ĉambro sur la 16-a etaĝo de New Yorker Hotel rapide pleniĝis per ĵurnalistoj kaj samideanoj. En Ameriko oni ne perdas la tempon.

Agrable estis revidi malnovajn konatojn. Agrable estis konatiĝi kun novaj. Ĝojige estis vidi membrojn de du movadoj — de la Esperanta kaj de la Bahaa — unuigitajn por labori por la celo, kiu por la unuaj brilas per verda stelo sur la nuba ĉielo de la homaro, kaj por la duaj estas pilaro de nova Ordo de la Mondo, profetita de Baha'u'llah. Dum la tuta jaro tiu kunlaborado estis por

mi ĉiam fonto de ĝojo. Mi nur menciu la kurson en Lima, kie ne estis antaŭe esperantistoj, kaj kiu estis organizita de bahaanoj. Sen ilia helpo ne estus ankaŭ ebla la unua pedagogia Cseh-kurso en Ameriko, kiun mi antaŭ unu monato gvidis ĉi tie, en Eliot. Ankaŭ la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko alte taksis tiun kunlaboron, kaj esprimis, post la Kongreso en Cleveland, dankon al la Bahaa Organizaĵo pro la elmontrita helpo.

Sed la leganto deziras scii ion pri Nov-Jorko! Jes, kompreneble, mi ne povis ne vidi la imponan statuon de Libereco, kiu, elprofundiĝante el matena nebulo, ŝajnas majeste bonvenigi la ŝipojn, proksimiĝantajn al sia celo. Certe, mi ne povis ne rigardi la Urbegon de sur la pinto de la 103-etaĝa Empire State Building, la plej alta konstruaĵo de la mondo. Kiel sufoka estis poste la aero de la nov-jorkaj stratoj, kaj kiel zumis en miaj oreloj, kiam la lifto, svingiĝanta rapidege supren kaj malsupren, reportis min al la teretaĝo!

Ĉu vi ŝatas glaciaĵojn, kara leganto? Se jes, venu en Amerikon! Ĉi tie vi povos manĝi ilin trifoje tage, sendepende de la sezono. Glaciaĵoj estas kvazaŭ nacia amerika manĝaĵo, kaj oni povas aĉeti ilin en ĉiu apoteko. (Atentu: en la amerikaj apotekoj medikamentoj ŝajnas ludi malplej gravan rolon. Apoteko estas kune kafejo, papervendejo, ktp. Se vi ne scias, kie aĉeti ion, iru aŭ en apotekon, aŭ en universalan magazeno.)

La universalaj magazenoj de la eŭropaj ĉefurboj paliĝas antaŭ la amerikaj. Ĉiu trovos tie ion laŭ sia plaĉo: ĉu altan kvaliton aŭ moderan prezon, ĉu mal-karan brilaĵon aŭ valoran juvelon, ĉu lertan konsilon aŭ sentrudan servon. Plej oportunaj tamen estas vendejoj, nomataj simple « 5 kaj 10 », ĉar la plej oftaj prezoj tie estas kvin kaj dek cendoj. Tie oni povas aĉeti ĉion, kion oni praktike bezonas en la ĉiutaga vivo: vintre varmajn gantojn, somere bankostumon, kaj en ĉiuj sezonoj — glaciaĵojn.

Ĉe la liftoj de la universalaj magazenoj dejas nigraj lististinoj. Ekzistas liftoj lokaj kaj ekspresaj; la lastaj haltas nur ĉe aŭ super certa etaĝo. Same okazas en hoteloj kaj grandegaj konstruaĵoj, nomataj simple « buildings », t.e. konstruaĵoj, ĉar la senĉesa haltado de liftoj ĝenus kaj prokrastigus la loĝantojn aŭ interesulojn de la dudeka aŭ trideka etaĝo. Ankaŭ la subtera fervojo de Nov-Jorko posedas duoblajn liniojn; por vagonaroj lokaj kaj ekspresaj. Por diri sincere, ĉi tiun dividon mi trovis ne speciale praktika kaj ofte konfuza; entute la organizo de la subvojoj de Nov-Jorko ne estas, laŭ mia sperto, komparebla al la subvojoj de Parizo.

La loĝantoj kaj gastoj de la franca ĉefurbo plendas pri interpretemo en la parizaj subvojoj dum la « horoj de frekventeco ». Se iu el ili nur unu fojon en la vivo troviĝus en nov-jorka subvojo je la kvina horo posttagmeze, li ne parolus plu pri la pleneco de la parizaj komunikiloj. Haringoj en barelo ĝuas komforton kaj lukson de spaco kompare kun nov-jorkanoj en subvoja

vagono post la fermo de vendejoj kaj oficejoj!

Tamen ne ĉiuj nov-jorkanoj interpremas sin tiamaniere. Usono estas ja la lando de aŭtomobiloj. Jen karakteriza trajto: en Nov-Jorko oni vidas multajn taksiojn. La senfina fluado de aŭtomobiloj konsistas preskaŭ nur el privataj veturiloj.

En kelkaj landoj malriĉulo, kiu ne povas aĉeti novan veston, iras en vendejon de malnovajoj kaj akiras malnovan mantelon. Amerikano, kiu ne povas aĉeti novan aŭtomobilon (tiaj personoj estas multaj), sed trovas, ke li bezonas propran veturilon (tiaj personoj estas ankoraŭ pli multaj), iras sur placon, kie malnovaj veturiloj, ofte en tute bona stato, atendas aĉetonton, kiu estos pli indulgema, ol la antaŭa mastro, se io en la detalo de la aŭtomobilo ne konformas plu al la lasta modo.

Kaj tiel fluas, fluas tra la stratoj amasego da aŭtomobiloj. Ekzistas kuraĝuloj (ne mi!!!), kiuj penas trabori inter ili sian vojon kaj atingi la kontraŭan irejon de la strato. Ĉiutage morto havas riĉan rikolton sur la stratoj de amerikaj urboj kaj sur la interurbaj vojĵoj. La homoj, kiuj ne volas tiamaniere riski sian vivon, atentis la trafikajn lumojn.

Trafikaj lumoj, neregule renkontataj en Eŭropo, estas unu el la karakterizoj de la usonaj stratoj kaj vojoj. Ĉe ĉiu, aŭ preskaŭ ĉe ĉiu vojkruciĝo staras altaj fostoj, provizitaj per lanternoj ruĝaj kaj verdaj. La verda koloro signifas: «iru!», la ruĝa — «haltu!». Inter la estingiĝo de unu kaj eklumo de la alia aperas iafaje flava lumo, kiu signifas «atentu!», t.e. estu prudenta, malrapidu. Anekdoto rakontas, ke kandidato je policisto, demandita dum la ekzameno, kion signifas la flava lumo, respondis: «ĝi signifas: rapidegu antaŭen, por ne esti haltigita per lumŝanĝo». Bedaŭrinde, la anekdoto ofte montriĝas vero. Kaj tiam aŭdiĝas sur la strato longa, daŭranta signalsono. Ĝi anoncas, ke ruĝakruca aŭtomobilo rapidas al loko de akcidento, aŭ ke polica veturilo rapidas defendi ordon kaj leĝon.

Ordo kaj leĝo ja estas rompataj ĉie. Unu popolo armigas sin kontraŭ alia, unu kaptas la posedajon de alia. Amerikano, al kiu eŭropano riproĉas la kutimojn de la amerikaj gangsteroj, respondas: «Nu, vere, ni havas gangsterojn. Sed ĉu sur aliaj kontinentoj ne regas inter-nacia gansterismo?»

Gangsterojn mi tamen ne renkontis. La peno ne valoris por ili do mi ne povas priskribi iun emociigan aventuron pri forkapto, monpostulo ktp. Apenaŭ iam lernanteto en kurso minacis forkapti mian flavan hundon, se li ne ricevos la ĉokoladon, kiu ekscitadis ĝeneralan intereson kaj apetiton de la Cseh-kursanoj. Min mem neniu forkaptis, kvankam mi aŭtomobilis nokte eĉ en la ĉirkaŭaĵoj de Ĉikago, la urbo de gangsteroj.

Sed mi ne venis en Ĉikagon por konatiĝi kun sinjoro Al Capone. Alia intereso altiris min tien.

En antaŭurbo de Ĉikago, Wilmette, troviĝas impona konstruaĵo, ankoraŭ ne tute finita. De malproksime vidiĝas blanka, punta kupolo, kronanta konstruaĵon tute novan laŭ stilo, naŭflanken, naŭpordegan. Vizitanto, kiu demandas pri la signifo de tiu konstruaĵo, ricevos respondon, kiu sonos kvazaŭ eho de iu potenca voko, aŭdita de la homaro en tempoj pasintaj forgesita kaj tial renovigita. Li aŭdos, ke en malproksima Irano aperis Profeto, sendita ne al unu gento, unu nacio aŭ unu religio, sed al la tuta mondo — por fari ĝin unu hejmo, al la tuta homaro — por fari ĝin unu familio.

Ni vivas en tempo senekzempla, sensimila. La homoj kuradas, laŭ la malnova esprimo «tien kaj reen», sed trovas nek eliron, nek rifuĝon. Aperas amase teorioj, skoloj, ismoj; ili akiras rapide amasojn da adeptoj kaj perdas ilin same rapide, ne sukcesinte doni al ili ion kontentigan. Teorioj kaj doktrinoj naskiĝas, vivas la vivon de papilioj kaj malaperas; dume en la antaŭurbo de Ĉikago kreskas, malrapide sed firme, templo senkompara en sia majesteco, grandioza en sia desegno, nova en sia stilo. Estas en ĝi nek orgenoj, nek altaroj, nek pastroj, nek ritoj. Gloro estas tie donata al Dio, kiu sendadis al la homaro Siajn Senditojn en la pasinteco, kaj kiu sendis en ĉi tiu tago novan Parolportanton, por proklami al la mondo la leĝon de amo, la leĝon de

de unueco. Tiu templo estas la unua Bahaa templo en la okcidento.

Mi estis ankoraŭ nek apud Niagaro, nek en Hollywood. La grandioza akvofalo atendas pacience, ĝis mi havos okazon admiri ĝian potencon. La deziro iĝi filmstelo forlasis min delonge. Kaj dume en Ameriko en ĉiam pli multaj koroj firmiĝas konvinko, ke la mondo eniras en novan epokon, ke post ĉiaj skuoj kaj battoj eklumos fine por la homaro nova tago. Kaj necesas labori, por ke tiu konvinko kresku. Kaj necesas labori, por ke tiu tago venu.

La usonaj esperantistoj festis sian kongreson en Cleveland. Ho, kiel bravaj, kiel ekzemplaj samideanoj estas meze de la amerika esperantistaro! Kiel modeste kelkaj el ili scias labori, kifuzante brilajn titolojn kaj pacience tirante la ĉaron tra sabloj kaj ŝtonoj. Ameriko ne troviĝas inter la unuaj landoj de Esperantujo. Tio estas simpla, ĉar la lingva problemo ne estas ĉi tie tiel sentata, kiel en Eŭropo. La laboro de la esperantistoj ofte estas ĉiam ankoraŭ pionira. Sed la amerikanoj scias, kio estas pioniro: homo, kiu iras antaŭen kun hakilo en la mano, hakas vojojn tra virgaj arbaroj kaj plugas novajn kampojn. Kaj la amerikaj samideanoj iras kun hakiloj en la manoj, por haki la murojn de indiferenteco, por plugi la verdan kampon de la homaro, por — apud la stela standardo de Usono — levi alian stelan standardon, la Verdan Standardon.

Green Acre, Eliot, Maine,
la 15-an de aŭgusto 1938.